MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 1

JANUARO 2019 Kol. 405/35

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Novjara saluto, E-klubo Benešov, Rememoro el infaneco, Statueto de elefantido, Infana cerbo en lernejo, E-kurso en Ml. Boleslav

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

# P. F. 2019

Novjara mesaĝo
de la prezidantino de AEH

**Estimataj kaj karaj geamikoj,**

la jaro kun plua jaro denove renkontiĝis kaj mi volus ĉe tiu ĉi okazo deziri al vi en la nova jaro 2019 multe da sano, feliĉo, kontento kaj vivharmonio, sed ankaŭ danki al ĉiuj niaj kunlaborantoj, kontribuantoj kaj korektantoj, kiuj helpadas ĉe la preparo de Informilo. Danki ankaŭ al nia ĉefredaktorino Jarmila, kiu la gazeton por ni regule eldonadas jam 20 jarojn. Estas ĉefe ŝia merito, ke la gazeto Informilo estas plena de interesaj informoj.

Tre ĝoje ni ĝisatendadas vian eĥon, ke nia gazeto estas ĉiam legata kaj dezirata. Sed neniu skribis, ĉu la Informilon vi povas pli bone legi en pli grandaj literoj. Ni anoncis literaturan konkurson, venis bedaŭrinde nur du artikoloj. La pasinta jaro 2018 estis denove plenplena de E-agadoj, mi memoru nur la 20-

an Esperanto-tagon sub la monto „Kunětická hora“, UEA-kongreson en Lisbono, seminariojn en la vilaĝo Skokovy, ĈEA-konferencon en Benešov, pluajn agadojn de E-mentala kolektivo. Ĉe fino de la jaro renkontiĝis multaj esperantistoj en la praga „Nová scéna“ (Nova scenejo de la Nacia teatro) de la aŭtoro Ivan Acher ĉe la opero Sternenhoch kantita en Esperanto. Ne ĉiuj partoprenis komunan foton post la prezento, sed sciu, ke ĉeestis kelkaj eksterlandanoj.

En la jaro 2019 okazos la mondkongreso de UEA en finna urbo, en Lahti. Kelkaj esperantistoj jam preparas sin. Mi tamen ne aranĝos karavanon, kiel mi faris en pasintaj jaroj. En la venonta jaro estos cent kvindeka datreveno de naskiĝo kaj centa datreveno de morto de la fondinto de la E-klubo MUDr. Stanislav Schulhof.
Ĉe tiuj okazoj ni volas prepari renkontiĝon en Pardubice, (laŭ plane la 21an de septembro).
Se en la postvenonta jaro 2020 estos intereso pri la kongreso en Montreal, eble mi planos la karavanon. Kelkaj esperantistoj preferas la partoprenon en la „Baltaj tagoj“, do certe ni volonte legos iliajn travivaĵojn.
Mi deziras al vi ĉiuj en la jaro 2019 ĉefe firman sanon kaj konservu la favoron al nia AEH. Via Lenka Angelová

# Kio okazis dum la jaro 2018 en Esperanto-klubo Benešov?

PRINTEMPE, maje, ni festis la 35-an datrevenon de refondiĝo de la E-klubo, danke al instigo kaj agado de nia klubano Václav Stibůrek (Esperanto en Benešov havas pli longan historion, preskaŭ eĉ de komenco de la pasinta jarcento). Por la festo-aranĝo venis krom niaj klubanoj ankaŭ anoj de aliaj kluboj, ni

ĝojis pro ilia vizito. Kunvenis ĉirkaŭ 25 personoj.
SOMERE okazis por ni festo de renkontiĝo kun niaj konatulinoj, 4 esperantistinoj el Japanujo. Kun du el ili

korespondas niaj 2 klubaninoj. Ili loĝis en Praga hotelo kaj deziris viziti Muzeon en Terezín kaj spekti la desegnaĵojn de judaj infanoj. En ege varma tago Vlasta kaj mi persvadis ilin nenien vojaĝi, sed viziti judan sinagogon (de Pinkas) en Prago, ankaŭ tie estas bildoj de judaj infanoj. La ekspozicio tre plaĉis al ili. La varmegan posttagmezon ni vere agrable travivis en botanika ĝardeno.
La sekvantajn du tagojn nur Vlasta dediĉis al ili – ili vizitis diversajn vidindajn lokojn en Prago.

AŬTUNE, oktobre, nia E-klubo kune kun ĈEA organizis konferencon, feston de la renkontiĝo de esperantistoj. Pri la konferenco vi povis legi en la pasinta numero de INFORMILO. Ni, beneŝovanoj, supozas, ke la preskaŭ tritaga komuna restado plaĉis al la partoprenantoj. Malgraŭ tio, ke iuj preferus pli detalan, pli ampleksan traktadon, ni proponis kaj traktadon kaj ripozon dum societaj vesperoj kaj ankaŭ dum ekskursoj al la kasteloj Vrchotovy Janovice kaj Konopiště. Por kelkaj partoprenantoj estis interese viziti legianan vagonaron en stacidomo de Benešov.

Sed la ĉefan, vere belan, karan kaj agrablan feston ni travivis novembre, kiam nia Elka Škáchová, nia karulino kaj suneto, iĝis 90 jara! Krom

festen(et)o, donacoj, floroj kaj torto kun E-stelo estis en la klubo babilado, kantado kaj trarigardo de lumbildoj de antaŭaj E-aranĝoj. Kortuŝa atmosfero!
Fartu bone ĉiuj E-klubanoj, prosperu kaj ĝuu vian Esperanto-familion! Leonka Chaloupková

La dua artikolo por la literatura konkurso:

# Rememoro pri kristnaskotempo el mia infanaĝo

La plej vivaj rememoroj aperis en mia penso el mia infanaĝo okaze de la tagoj ĉirkaŭ Kristnasko, ekzemple pri odora arbeto en ingo kun akvo. Sur la arbeto estis veraj vaksaj kandeletoj kaj danĝeraj petardetoj. Mi rememoris, kiel mi kuris al grandaj pakaĵoj, sed tiuj paketoj estis molaj, ili enhavis bedaŭrinde nur vestaĵon por mi kvazaŭ por plenaĝa fraŭlino, kvankam mi estis nur infano, kiu komencis viziti bazan lernejon...

Mi tre antaŭĝojis ricevi librojn – miajn fidelajn amikojn, pli ŝatataj ol televidaj fabeloj. Mi rememoris karolojn aŭditajn el radio kaj ankaŭ, kiam mia panjo ludis ilin post la festenvespero. Mi pensas ankaŭ pri mia ĝojo viziti mian onklinon, kiu posedis betlehem-figuraron, belege eltonditan; kaj cerbumas pri vizito de la preĝejo dum Kristnasko, kiu ne estis ofta.
Nun mia edzo kaj amikino ne emas viziti noktomezan meson kaj bedaŭrinde eĉ la atmosferon de preĝeja meso de Jakub Jan Ryba la 25-an de decembro. Tion mi ne povas plene travivi, ĉar kutime nin vizitas familioj de niaj infanoj kaj iliaj genepoj. Iliaj brilantaj okuloj anstataŭas atmosferon de preĝejo, kiam homoj unu al la alia deziras amon.
Jes, dum Kristnasko estas por mi grava valoro de interhomaj rilatoj. Mi neniam komparis ilin kun la mono kaj mi bedaŭras

tiujn homojn, kiuj ricevas sub la arbeto nur koverton kun mono kaj mankas al ili ĝojo, kiun travivas iu alia per eta donaceto. En pasinteco regis modesto, kristnaskaj festoj daŭris nur 3 tagojn kaj mastrinoj laciĝis per ordigo kaj preparo de manĝaĵoj kaj dolĉaĵoj. Nun ni povas pasigi adventan tempon per diversaj kunvenoj, vizito de teatraj scenetoj. Jam multaj homoj preferas travivaĵojn kontraŭ plenplena tablo de manĝoj kaj multaj vojaĝas. La tempoj ŝanĝiĝas, reklamoj penetras kaj influas nin kaj ne ĉiu sinkas en agrablajn rememorojn de pasinteco.

Do, ĉion plej bonan en la jaro 2019 kaj nombrajn literaturajn inspirojn por Informilo kaj al ĉiuj anoj de AEH sanon kaj trankvilajn momentojn! Blanka Hužerová el Mladá Boleslav

## Elefantido sube de la montopinto Králický Sněžník

En Informilo 5/2018 mi legis la artikolon pri Moravo kaj Moravio kaj ankaŭ pri nekutima statueto de elefantido apud la montopinto Králický Sněžník. Ĉar mi ŝatas montaron Jeseníky kaj tiun ĉi montopinton mi vizitis multfoje somere, aŭtune eĉ vintre, mi elserĉis kelkajn informojn rilate al la ŝtona elefantido.

En 20-aj kaj 30-aj jaroj de la lasta jarcento renkontiĝis internacia grupo de junaj artistoj – ĉeĥoj kaj germanoj en tiama Liechtenstein-montargastejo sube de la montopinto (konstruita en 1912, likvidita en 1971). En la jaro 1932, okaze de la 10-a datreveno de la fondiĝo de sia grupo ili starigis apud montargastejo tiun ĉi statueton. La proponon de la statuo preparis Amei Hallegerová, edzino de la artpentristo Kurt Halleger el Šumperk,

artobjekton de la elefantido pretigis la ŝtonĉizisto Föster el Zlaté Hory. Jaroslav Matuška

# Kion lernejo faras al la cerbo de infanoj?

Kiu el ni memoras, kion ni lernis en nia lernejo? Ĉiu normala homo devus memori, ĉar alikaze kiucele ni sendas niajn infanojn en la lernejon? Kial do ni ne memoras? Tio ligiĝas kun neŭrologio. Ĉefa problemo estas, ke la lernanto en lernejo ne lernas, sed ESTAS INSTRUATA! Por la cerbo estas granda diferenco. Esti instruata signifas lerni sen pensi. Tial post tridek jaroj ni nenion memoras. Aktiva instruisto estas sendanto kaj pasiva lernanto estas ricevanto. Instruisto transsendas informojn pervorte. La vortoj akiras nur tiun cerboparton, kiu transprenas la sonon. Kion fari, por ke la lernanto lernu?

Por ke tio okazu, en la cerbo de la lernanto devas okazi grava kemia reakcio – devas vekiĝi kelkaj nervaj perantoj por liveri al la ĉeloj certajn informojn; tiuj perantoj estas hormonoj (kiel endorfino, dopamino, adrenalino, noradrenalino k.a.). Ekzistas nur unu maniero ebliganta la produktadon de tiaj hormonoj, nome oni devas veki emociojn. La lernanto (infano) devas esti scivolema, fascinita kaj devas esti aktiva almenaŭ intelekte. Alikaze la kemia reakcio ne akiros la cerbon, kaj la infano ne lernos. Ĝis kiam la instruisto staras nur vidalvide al 30 benkoj, en kiuj sidas neaktivaj lernantoj, ĝis tiam ni perdas la potencialon de tiuj infanoj.

Sidigi lernantojn en la lerneja benko kaj ordoni al ili esti pasivaj, signifas fari perforton al la homa naturo, ĉar nature la infano

estas aktiva. Sidigi infanon en la benko estas fizika kaj psika malbono. Sed ĉu vere lernejo estas tiel malbona? Ja ni ĉiuj finis normalan lernejon, ĉu ne? Kiel tio okazas, ke multaj el ni nun bone prosperas, malgraŭ ke ni finis iam tiuspecan lernejon? Eble pro tio, ke pluraj homoj ĉiutage multe legas, kaj ili opinias, ke la tago sen legi ion estas la tago perdita.

Oni do povas ŝpini la konkludon, ke kvankam la lernejo estas stulta, tamen ĝi almenaŭ instruas nin legi. Kontraŭe! La lernejo ne instruas legi, aŭ almenaŭ ne faras tion efike. Bedaŭrinde multaj esploroj pruvas, ke la nuntempan socion kreas duon-analfabetoj, refojaj analfabetoj kaj la analfabetoj funkciaj. Okazas tiel, ĉar la lernado en lernejo estas teda, kolektiva agado. Ofte baze de idiota teksto, infanoj tiras la anticipe truditajn konkludojn. Baze de stultaj tekstoj en abocolibro infanoj rapide orientiĝas, ke la legado estas teda kaj nebezonata.
Sed imagu, ke kiam ekz. instruisto skribus precize sur la tabulo, kiuloke sur la lerneja ludejo troviĝas la kaŝita trezoro, plej certe lernantoj farus ĉion eblan por tralegi tian sciigon, ne gravas, kiom da literoj ili jam ekkonis! Krome oni kutime instruas legi per voĉsonigado, kio havas neniun logikan argumentadon. Ne-ni-u ti-el pa-ro-las! Izolado de konkretaj literoj kaj silaboj malhelpas kaj blokas la procezon de la lernado legi. Kion ankoraŭ la lernejo faras malbone? Bonŝance la lernejo, kiel centre stirita eduksistemo, ne estas unusola ebla elekto por ni.

Ĉiun 45-an minuton okazas la paŭza sonorigado. La infanoj estas dividataj je samaĝulaj klasoj. La scio estas dividita je apartaj lernobjektoj. La lernoprogramo estas altrudita. Kaj multaj, multaj aliaj malĝustaĵoj okazas tie. Lernejo estas la manifesto de la malkono de la homaj psiko kaj cerbo. Ĝi transdonas la scion en la plej malfacila formo por la cerbo. La

lernejo ne nur ne kapablas prepari la infanojn al la vivo en la estonteco – ĝi ne scipovas provizi ilin per tiel simplaj kompetentecoj kiel legado.

Bonŝance la lernejo, kiel centre stirita eduksistemo, ne estas unusola ebla elekto por ni. Sed kion faras ni – plenkreskuloj? Ni priparolas malbonajn temojn pri la lernejo, ni bone scias, kio en la instruado estas malbona, sed ni daŭre ne tiras el tio konkludojn. Ni pensas, sed ni ne lernas, ni ne lernas baze de eraroj, sed ni plu faras la samajn erarojn. Laŭ Konfuceo „Lerni kaj ne pensi, estas perdo de la tempo. Pensi, kaj ne lerni, estas danĝero”. Andreo Bach

## E-kurso en Ml. Boleslav

La dua parto de la kurso Esperanto finiĝis la 18-an de decembro 2018 en la biblioteko Ml. Boleslav. Ni daŭrigos de la 9.1.2019. J.Drahotová

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.